

Kie MAAS kaj WAAL kunfluas kaj GORINCHEM vidiĝas de malproksime.
Leviĝas maldekstre tia kastelo reflektita en la larĝa fluo.
Estas LOEVESTEIN pri kiu la mondo parolis.
(Poemo de Hendrik Tollens 1812)

Woudrichem aŭ Wurkom estas unu el la plej malnovaj urboj en la lando. En 866 ĝi jam estis konata kiel merkata kaj fiŝkapta loko al la Diocezo de Utrecht. Jam en la 14-a jarcento sub la gvidado de la grafoj de ALTENA, precipe tiuj de la VAN HORNE-familio, la unuaj fundamentoj estis metitaj por la fortikaĵo. La remparoj nun ofertas belan vidon al la riveroj, tamen en la pasinteco ili servis kiel protekta konstruaĵo.

Wurkom estis strategie grava fortikaĵo, ĉar ĝi situis kie la du plej grandaj riveroj kuniĝis kaj estis la limo de la provincoj de ZUID-HOLLAND, GELDERLAND kaj BRABANT.
La akvo- aŭ prizon-pordego staras sur la plej malnova konservita fundamento de la remparoj. Ŝtonaj kuglegoj enkonstruitaj en ĝi ilustras la perforton de milito, al kiu la loĝantoj de tiu tempo estis elmetitaj.

En 1568 la lasta Grafo de Horne estis ekzekutita laŭ ordonoj de la hispana vicreĝo ALVA.
Wurkom estis vendita al la Ŝtatoj de Holando kaj Okcidenta Frislando kaj integrita en la tielnomita VESTING HOLLAND kaj tiam transformita al ĝia nuna stato. Kune kun DEN BRIELLE, NAARDEN kaj WILLEMSTAD, WOUDRICHEM estas unu el la malmultaj nedifektitaj fortikaĵoj, kiuj estis konservitaj. La unika loko de Wurkom ne nur alportis militon kaj mizeron, sed ankaŭ prosperon, vojdepagon sur la rivero kaj la antaŭe akiritan merkato- kaj fiŝkaptado-rajtojn.
Tiuj ĉi rajtoj, kelkaj el kiuj ankoraŭ ekzistas hodiaŭ, kreis viglan komercon kaj stabilajn enspezojn por la loĝantoj. Ĉi tiu ekonomia situacio de la urbo reflektiĝas en la HOOGSTRAAT-domegoj kun la belaj fasadoj. Du el la vidindaĵoj de la fortikaĵo estas la malfrugotika preĝejo, konstruita en 1455 kaj la urbodomo el 1592.

La blazono de Wurkom pruvas, ke ĉefe la fiŝkaptado industriigo famigis la urbon. La riverfiŝkaptistoj havas la saman vivon kiel antaŭe. Ili spitas "veteron kaj venton"; somere ili kaptis angilon per nasoj kaj vintre alvulon per retoj. Tio certigas porvivaĵojn dum la tuta jaro.

La diferenco inter la nuna kaj antaŭa rivera fiŝkaptado plejparte konsistas el la uzo de materialoj. Remiloj kaj veloj estis anstataŭigitaj per motoroj kaj la retoj ne plu estas faritaj el kotonon sed el nilonfadenon; pretigi la kotonon por plilongigi la uzodaŭron per tanado, farigis superflue. La maniero de fiŝkaptado fakte restis la sama. Granda reto, la seĝo, por la fiŝkaptado estis trenita tra la akvo kaj tiam kun la kaptado pendigita borde.

Dum la pasintaj 50 jaroj, la fiŝaro en la rivero multe ŝanĝiĝis. La alvuso estis unue ekstermita en la ringa kanalo, ne povis resti profita la fiŝkaptado.
En la pasinteco diversaj migrantaj fiŝspecioj troviĝis en la rivero, kiel ekzemple: sturgo, salmo, koregono kun alozoj. Tiuj migrantaj fiŝoj venis el la maro grandnombre. Nenio povis malhelpi ilin atingi siajn frajejojn en la montoj.

Jam la Grafoj de Altena agnoskis la ekonomian signifon de la rivera fiŝkaptado kaj tiel baldaŭ ekestis intensa fiŝkaptado en Woudrichem. Jam en la jaro 1322 kun JAN VAN ARKEL, Grafo de Gorinchem – urbo situanta je la alia flanko de la rivero – la limoj de la fiŝkaptado estis ekzakte fiksitaj. Eĉ malnovaj pramorajtoj estis interŝanĝitaj kontraŭ pli bonaj fiŝkaptaj rajtoj.

En la jaro 1362 LOEF VAN HORNE, Grafo de Altena, kiu igis konstrui Loevestein-kaastelon, donis al la burĝoj de Woudrichem gravan privilegion. Kontraŭ pago de kompensaĵo – 20% –a de la fiŝkaptado – la Woudrichemaj enloĝantoj rajtis fiŝkapti en la akvoj de la Grafo de Altena. La kondiĉo estis ke oni ĉiujn

fiŝojn portu al la foiro en Woudrichem. Tiuj privilegioj regule estis kontestitaj, restis tamen validaj (laŭleĝaj) ĝis la nuna tago.

La multecon de fiŝaj specioj oni povas nomi unika.

Laŭsezono oni kaptis angilon kaj osmeron per korboj aŭ hokarŝnuroj kaj ankaŭ perkon kaj ploton per specialaj retoj. Tamen Woudrichem famiĝis precipe pro la salmokaptado. En la 19-a jarcento staris en la urbo 9 salmofumejoj. Ĝis fine de la 19-a jarcento Woudrichem kune kun HET KRALINGSE VEER estis unu el la plej konataj urboj por la albordigo de riveraj fiŝoj.

Inter la jaroj 1893 kaj 1896 la nombro da kaptaĵoj atingis ĉirkaŭ 26.000 salmojn kaj sekve ankaŭ la kulminon de la aktivado pro la fiŝaŭkcio en Woudrichem. La fiŝkaptado kaj la fiŝistoj stampis la karakteron kaj la aspekton de la urbo. Komence de la 20-a jarcento okazis ŝanĝiĝo. La salmokaptoj daŭre plimalgrandiĝis kaj tutlande multaj fiŝistoj devis ĉesigi sian metion. Kontraste al tio en Woudrichem oni fiŝkaptis pli kaj pli fore.

Dank'al sperto kaj persisto oni daŭre povis forveturi en 100 fiŝboatoj.

Tiu bona ekonomia situacio de la urbo speguliĝas en la burĝodomoj en HOOGSTRAAT kaj la multaj belegaj fasadoj (frontoj). Du el la multaj vidindaĵoj en la iama fortreso estas la en 1455 konstruita malfrugotika preĝejo kaj la en 1592 konstruita urbodomo. La blazono de Woudrichem pravas ke la riveroj alportis plian profiton, nome la abundon de fiŝoj kun la preskaŭ neelĉerpebla rezervujo de diversaj fiŝspecoj.

La urbo famiĝis speciale pro la fiŝkaptado. Ankoraŭ nun la riveraj fiŝistoj vivas same kiel antaŭe. Dumsomere oni fiŝkaptas angilojn per kaptokorboj kaj dumvintre makrocefalojn per retoj. Per tio ilia tutjara vivtenado estas garantiita. Pere de la fiŝkomerco la kaptaĵoj atingis la konsumantojn.

La diferencoj kun la antaŭa fiŝkaptado troviĝas ĉefe en la materialoj. Remilojn kaj velojn anstataŭis motoroj kaj la retoj ne plu estis noditaj el kotono sed el nilonaj fadenoj. Konservado de la kotono per la tiel nomata tanibrunigado, fariĝis superflua.

La fiŝspecoj verdire restis la samaj. Grandan reton, seĵnon, oni trenas tra la rivera akvo kaj tuj poste albordigas kun la kaptaĵo. En la daŭro de 50 jaroj la fiŝado en la riveroj forte ŝanĝiĝis.

La alvuso kiun oni por la sporta fiŝkaptado metas en la kanalojn kaj ringan kanalon povas esti profitdona por unuopuloj, sed ne proporcie egalas al la kaptaĵoj en la antaŭaj jaroj.

Antaŭe migrantaj fiŝspecoj kiaj sturgo, salmo, koregono, alozo kaj klupeoj, vivis en tiuj riveroj. Ĉi tiuj migrantaj fiŝoj amase alvenis el la maro kaj nenio povis malebligi ilin atingi la frajejojn en la montaro por tie breidi idaron.

Pagante certan parton de la kaptitaj fiŝoj, kvar aŭ kvin fiŝistoj treniĝis per ŝarĝoŝipo al la fiŝkaptejoj.

Sed ankaŭ tiamaniere la malkresko estis nehaltigebla. En 1950 la migrantaj fiŝspecoj kiel salmo, sturgo, koregono kaj alozo malaperis definitive, pro kio la fiŝistoj de Woudrichem porĉiame devis lasi siajn retojn enŝipe.

La kialoj de tiu malkresko estas multoblaj:

1. Baraĵoj kaj kluzoj malebligis la migrantajn fiŝojn atingi siajn frajejojn.
2. Troa fiŝkaptado de iuj specioj.
3. Kanaliĝo kaj reguligo de riveroj kaj la mekanikigo de navigado.
4. La pliiĝanta poluado de la akvoj.

En la daŭro de 50 jaroj la natura ekvilibro inter homo kaj besto, inter fiŝisto kaj fiŝo, kiu dum pli ol 5.000 jaroj ekzistis, perdiĝis porĉiame kaj kun tio ankaŭ la malnova metio de la riveraj fiŝkaptistoj. La fiŝkapta muzeo Woudrichem starigis al si la taskon, teni viva por la futuraj generacioj ĉi tiun malaperintan metion. Dank'al la iniciato kaj dediĉo de multaj burgoj kaj la nemalhavebla helpo de diversaj aŭtoritatoj eblis krei ĉi tiun muzeon.